Informele

# Esperanto-klubo "La Konko" – Oostende

afdeling van de vlaamse esperantobond sekcio de flandra esperanto-ligo

esperanto
internationale taal

Oostende, la 11-an de junio 1990

ESPERANTO KLUBO
LA KONKO
OOSTENDE

Karaj gesamideanoj,

La LIMBURGA TAGO ĉi-jare okazos la 18-an de aŭgusto en GENK.

Sekve al petoj de okcidentflandraj geamikoj ni estas pretaj organizi aŭtobusan transporton el Oostende, kun haltejoj en Brugge, Gent,Aalst aŭ Sint-Niklaas, se sufiĉe da kunvojaĝontoj sin prezentus.

Prezo(j) ankoraŭ ne fiksiĝis. Per tiu ĉi letero ni nur anoncas eblecon kaj petas vin sciigi al ni vian eventualan partoprenon. Do ĝis nun rilatas nur pri principo. Ni petas la grupojn informi iliajn anojn pri ĉi tiu plano.

Por anonci vian konsenton, bonvolu kontakti nian sekretariejon, skribe ekde hodiaŭ, sed telefone nur ekde la 1-a de julio; ambaŭokaze nepre antaŭ la 10-a de julio.

Sincerajn salutojn !

La estraro de LA KONKO

==========================================================

Programo: ekde la 10-a horo, akcepto en la urbdomo kaj parolado de la urbestro.

Kunvenloko:
"KULTURA CENTRO" GENK
Dieplaan 2 (Urbdomo)
B-3600 GENK.

| | |
|---|---|
| 11.00 | interkonatiĝo kaj eventuala rondiro en la urbdomo kaj Kultura Centro (gvidata). |
| 12.00 | lunĉo, bulkoj kun kafo. |
| 14.00 | rondveturado aŭtobuse en Genk kaj ĉirkaŭaĵo. |
| 18.30 | ampleksa malvarma plado. |
| 20.00 | Limburga vespero, prezentadoj, teatraĵoj kaj agrabla kunestado. (trinkaĵoj je modestaj prezoj). |

Limburga Esperanto Ligo
p/a.: A.CLAESEN
Zonnebloemstraat 13
B-3610 Diepenbeek
bankkonto: 068-2057146-94

Kotizo: 600 fr. (300 fr. por -16 jaraj infanoj).

Enskribiĝu <u>antaŭ</u> la 1-an de aŭgusto 1990 !!!